


tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

aprilo 2011
n-ro **110**



- ★ Bonvenon al Bjelovar al la 9a kongreso de kroataj esperantistoj la 14an kaj 15an de majo
- ★ Senpaga kongresa ekskurso por cent kongresanoj!
- ★ Ĉu studi Esperanton kiel ĝeneralan fakon en Filozofia fakultato de Zagrebo?
- ★ Ronda tablo pri Josip Velebit en Vrbovec

Karaj legantoj!

En Bjelovar "bolas" aktivecoj por la finaj preparoj de la **9a kongreso de kroataj esperantistoj**. Ĝi promesas esti ĉarma kultura renkontiĝo kun rekorda nombro da kroataj esperantistoj kaj gastoj el pluraj landoj. Ni prezentos tri ekspoziciojn kaj tri novajn librotitolojn dum la kongreso. Ni anoncas la librojn al vi ĉi-numere: du tradukitaj el la kroata al Esperanto: **Pirgo de Anđelka Martić**, eldonata de **Grafokom Durđevac** en traduko de **Josipa Katunar** el Rijeka kaj **Vivo de Damoru de Trailokyanat Mukhopadhay**, eldonata de **Izvori** kaj tradukita de la bengala al Esperanto de **Malasree Dasgupta**. La trian libron havigis por ni **Saša Kocian** el **Osijek**. Temas pri la hungara verko **Sklavoj de Dio**, tradukita per Esperanto kroaten. La libron eldonas **Grafokom el Durđevac**. Per tiuj libroj ni omaĝas al bjelovara esperantisto **Fran Kolar Krom**, kiu antaŭ cent jaroj ĝuste en **Bjelovar** esperantigis la unuan verkon el la kroata literaturo al Esperanto, la romanon de **August Ŝenoa La trezoro de l' oraĝisto**.

Jam pretas eleganta poŝtkoverta omaĝanta al **Fran Kolar Krom**, prizorgita de LKK-ano **Željko Saks**. Vidu ĝin ĉi apude.

La departemento **Bjelovarsko - bilogorska** regala la unuajn cent kongresanojn per senpaga busa ekskurso tra la regiono!

D-ro Velimir Piškorec zorgas ke plue disvolviĝas studado pri planlingvistiko (kun Esperanto) en **Filozofia fakultato de Zagrebo**, metante tiel nian ĉefurbon inter la gravajn kleriglokojn de la internacia Esperantujo.

Al Esperanta poeto **Josip Velebit** kultura instanco **Matica Hrvatska** el **Zaprešić** dediĉas **Rondan Tablon** okaze de la centa jubileo de lia naskiĝo en la urbo, kie **Velebit** plej longe lekciis, en **Vrbovec**.

Ni havis japanan gastinon

Kimie Markarian en februaro, kiu en pluraj zagrebaj lernejoj instruis pri la japana kalkulilo **sorobano**. En marto grandega tertremo damaĝis ŝian patrujon **Japanion** kaj ni disvastigas konsolan informon ke ĉiuj 77 esperantistoj en la trafita regiono travivis la katastrofon.

Vi legos du raportojn pri interesaj Esperantaj elpaŝoj en **Zagrebo** kaj **Bjelovar** en **Nokto de la muzeo**.

Pluraj niaj societoj lastatempe jarkunvenis. Ni prezentas la lastjaran honorigon al **Marica Brletić**, prezidantino de **Kroata Fervojista Esperanta Asocio**.

La plej malfacilan periodon transiras **Esperanto-Societo Bude Borjan**, kiu pro multaj problemoj devos estonte ĉesigi sian agadon. Je granda bedaŭro de ni ĉiuj.

Ni invitas vin en majo ne nur al **Bjelovar** sed ankaŭ al **Kostrena** kaj al **Hraščina** al scikonkurso respektive al **meteorita festo**. Legu detalojn!

Marija Jerković invitas helpi pri sia diplomlaboraĵo en **Universitato Adam Mickiewicz** en la pola urbo **Poznano**.

El la patrujo de nia forpasinta membro **Roger Imbert, Francio**, venas kontribuo pri la vivo de la verkistino **Colette**, el la plumo de la esperantisto **Roland Delegeau**, kiu konis la knabaĝan **Roger Imbert**. La teksto estas verkita dum la **Mediterranea Esperanto-Semajno** en **St. Raphael** apud **Nico**, kie **Spomenka Ŝtimec** instruis dum la unua semajno de marto, interalie pri la tradukoj de **Roger Imbert**.

Lucija Borčić omaĝas al verkistino **Višnja Stahuljak**, granda amikino de **Esperanto**, kiu mortis en marto 2011.


Ĉu mankas al vi **Esperantaj Vortaroj**? Bonvolu informiĝi pri la rabatitaj prezoj de la **Vortaroj Borčić**.

Esperantisto **Kruno Puškar**, la persono de la jaro 2010 el **Križevci**, prezentas sian biografion.

Tre koran dankon al multaj membroj kiuj subtenas nian estontan ejon en **Vodnikova 9**.

Eble ne plu foras la tago kiam nia rezidejo estos je tiu adreso.

Spomenka Ŝtimec



La koverta omaĝanta al Fran Kolar (maldekstre), kaj la poŝta stampo uzota en Bjelovar la 14-an de majo (supre).

Tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvarfoje jare - Jaro XXIX, numero 110 (1/2011), ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de Ministerio de kulturo de Respubliko Kroatio. Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de nevidantaj Esperantistoj. Voĉlegas Spomenka Ŝtimec.
 Redakcio: Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio, tel: (385 1) 4617550, fakso (385 1) 4619373, esperanto@zgt.com.hr, www.esperanto.hr - Kontribuis: Lucija Borčić, Višnja Branković, Marica Brletić, Roland Delegeau, Fredy Fijačko, Marija Jerković, Davor Klobučar, David Rey Hudeček, Judita Rey Hudeček, Kimie Markarian, Emilija Obradović, Josip Pleadin, Vjekoslav Morankić, D-ro Velimir Piškorec, Vanja Radovanović, Katarina Savić, Ljerka Stilinović, Dinka Šimunić, Spomenka Ŝtimec, Maja Valentić.
 Grafike aranĝis: Josip Pleadin. Presis: Grafokom, Durđevac, grafokom@kc.htnet.hr
 Anonctarifo: 1/1 paĝo 1000 kn (135 EUR), 1/2 paĝo 500 kn 68 EUR, lasta titolo paĝo 2500 kn (328 EUR). Abono kvar numeroj jare 60,00 kn. Por eksterlando 10,00 eŭrojn. Unuopa numero enlande 15 kn, por eksterlando 3 eŭrojn.
 La redakcio ne respondecas pri la opinioj en la subskribitaj tekstoj.

9-a kongreso de kroataj esperantistoj Bjelovar, 14-an kaj 15-an de majo 2011



9. kongres
hrvatskih esperantista
9-a kongreso
de kroataj esperantistoj

KONGRESA KOMUNIKO n-ro 2

KONGRESEJO

Nia kongresejo estas la urba Kulturdomo (Dom kulture), Ivana Mažuranića 6, Bjelovar.

La akceptejo funkcios ekde la 8h00 la 14-an de majo.

KONGRESA KARTO

Kune kun ĉi tiu komuniko la kongresanoj per poŝto ricevos/ricevis kongresan karton, kiun nepre kunportu al la kongreso kaj montru ĝin ĉe la akceptejo por ricevi kongresajn dokumentojn kaj nomŝildon. La numero de la kongresa karto estas la kongresa numero el la Kongresa libro.

PAGOJ

La kongresajn kostojn vi povas pagi favore al la ĝir-konto de Hrvatski savez za esperanto / Kroata Esperanto-Ligo, n-ro 2484008-1100881157. Por faciligi la administradon, en la rubriko "poziv na broj" ĉiam menciui vian kongresnumeron. Kvitancojn pri viaj pagoj laŭeble kunportu al la kongreso. Pagojn vi povos fari ankaŭ ĉe la kongresa kasisto tuj post transpreno de viaj kongresaj materialoj.

KONGRESA LIBRO

En la saketo kun la kongresaj materialoj troviĝos ankaŭ la Kongresa libro kun ĉiuj gravaj informoj kiuj helpas al vi esti bone informita pri la kongresa programo kaj la horaro.

PROGRAMO

La programo komenciĝos la 14-an de majo je la 10h00. Detala programo de la kongreso troviĝos en la Kongresa libro kaj en la kongresa retejo ĉe la adreso: <http://www.ipernity.com/blog/kroata.kongreso/320613>

KONGRESA RETEJO

Oficiala retejo de la 9-a kongreso estas: <http://www.ipernity.com/home/kroata.kongreso>
Konsultu ĝin ofte, aparte senpere antaŭ via alveno al Bjelovar.

LISTO DE KONGRESANOJ

Listo de kongresanoj troviĝos en la Kongresa libro kaj ĉe la interreta adreso: <http://www.ipernity.com/blog/kroata.kongreso/297682>

KONGRESA BUSO

Komuna buso por kongresanoj el Zagrebo startos la 14-an de majo je la 7h00 el la busparkejo apud la Hotelo "Esplanade" (Fervoja stacidomo). La sama buso startos en Bjelovar por retransporti la kongresanojn al Zagrebo, la 14-an de majo je la 22h00 el la parkejo de la Urba hospitalo (50 metrojn de la restoracio "Golub" en kiu okazos la amuzvespero).

GRUPO DE FERVOJISTOJ EL ZAGREBO

La 15-an de majo grupo de zagrebaj fervojistoj-esperantistoj organizas komunan trajnvojaĝon al Bjelovar. Al tiu grupo povas aliĝi ankaŭ aliaj esperantistoj, kiuj bonvolu kontakti la gruporganizanton Roža Brletić-Višnjić

(telefono: 091192688). La trajno alvenas al Bjelovar je la 9h08. En la Fervoja stacidomo de Bjelovar la kongresanojn atendas la busoj, kiuj veturigos ilin al la kongresa ekskurso. La ekskursantoj revenos al la stacidomo(j) de Bjelovar Ĝustateme por kapti trajnon aŭ busojn por reveni al Zagrebo.

KOMUNA FOTADO

Komuna fotado okazos ĉe la pavilono en la urba parko tuj post la kultura parto de la kongresa programo. Kongresanoj estas petataj post la finita programo direktiĝi al la pavilono kaj partopreni la fotadon. Se vi deziras havi profesie faritan foton (13x19 cm) kiel memoraĵon, bonvolu mendi ĝin en la akceptejo je prezo de 10,00 kunaĵoj. La disdonado de fotoj okazos la 14-an de majo dum la komuna tagmanĝo en la restoracio "Golub".

TAGMANĜO KAJ AMUZVESPERO

La komuna (malfrua) tagmanĝo kaj amuzvespero kun (danc) muziko okazos la 14-an de majo en la Restoracio "Golub". La kongresanoj direktiĝos al la restoracio post vizitado de la ekspozicio en la Urba muzeo, kaj la amuzvespero daŭros ĝis la 22h30, kiam ekveturos la kongresa buso al Zagrebo.

MANĜOJ

Principe la kongresaj manĝoj estas nevegetaraj. Se iu kongresano estas strikta vegetarano aŭ pro sanproblemoj ne rajtas manĝi viandaĵojn, tiu bonvolu informi la Organizan komitaton. Ni esperas trovi ankaŭ la eblecon por organizi la vegetarajn manĝojn.

FILMO PRI LA KONGRESO

Kompleta kongreso estos profesie filmita. El la filmita materialo estos ekstraktita kongresa filmo kiun ankaŭ la kongresanoj povos mendi je la prezo de 60,00 kunaĵoj ĉe la akceptejo. La filmo estos distribuata perpoŝte post la kongreso.

EKSPOZICIO EN LA URBA MUZEO

En la Urba muzeo estos organizita ekspozicio pri Esperanto, kiu oficiale estos malfermita la 13-an de majo (vendrede) je la 19h00. Kongresanoj kiuj tiutage atingos Bjelovar, estas invitataj ĉeesti la malfermon. Kongresanoj kiuj venos al Bjelovar la 14-an de majo, organizite vizitos la ekspozicion post la komuna fotado.

LOĜADO

LKK organizis loĝadon por kongresanoj en la Hotelo "Central" (V. Lisinskog 2, Bjelovar) kaj en pluraj privataj apartamentoj. Se vi ĝis nun ne rezervis vian lokon por loĝado, bonvolu nepre tuj kontakti la Organizan komitaton. Surlokaj mendoj de loĝado eblas nur en esceptaj kazoj, kaj nur en la Hotelo "Central".

KONGRESA EKSKURSO

Detalojn pri la kongresa ekskurso vi legos en la Kongresa libro. La ekskursaj busoj startos je la 9h00 la 15-an de majo.

La ekskurso inkluzivas viziton al Daruvar, Centro de Mato Lovrak en Veliki Grdevac kaj komunan tagmanĝo en la Rekreacia centro Kukavica. Vidu ankaŭ ĉe: <http://www.ipernity.com/blog/kroata.kongreso/311200>

FILATELAĴOJ

Okaze de la kongreso aperos speciala filatela koverto, kaj la 14-an de majo en la poŝtofiĉejo de Bjelovar funkcios porokaza stampo. La kongresanoj en siaj kongresaj materialoj ricevos donace unu ekzempleron de speciala koverto. Pliajn ekzemplerojn oni povos aĉeti en la poŝta giĉeto funkcionta en la kongresejo.

MEDICINA HELPO

La kongresa kotizo inkluzivas nenian asekuron. Ĉiu kongresano bonvolu mem zorgi pri tio kaj kunporti siajn medicinajn dokumentojn. Se vi uzas medikamentojn aŭ malsanas je specifaj malsanoj, bonvolu ĉe vi havi dokumentojn por helpi al medicinistoj en krizaj situacioj. Se vi estas handikapulo, la kongreson senpage povas partopreni via akompananto. Bedaŭrinde, la kongresejo ne estas adaptita por bezonoj de rulseĝuloj.

ENURBA TRANSPORTO

Bjelovar estas malgranda urbo kaj ne havas urban transporton. Por eventualaj transportaj bezonoj de niaj kongresanoj, staros je dispono kelkaj bonvolemaj helpantoj. Bonvolu ne misuzi iliajn servojn kaj kompreni ke temas pri amika helpo, sed neniukaze profesinivela servo.

PARKADO

Por parki en Bjelovar oni uzas biletaŭtomatojn, sed same kiel en aliaj urboj, malmultas lokoj por parkado. La Organiza komitato klopodas solvi tiun problemon. Se vi venas per propra aŭtomobilo, kaj se vi mendis loĝadon en Bjelovar, uzu la parkejojn de via hotelo kaj privata ludonanto.

LIBROSERVO

En la kongresejo ekde la 14-an de majo je la 7h00 ĝis la 15h00 funkcios kongresa libroservo, en kiu vi povos aĉeti ĉiujn librojn prezentotajn en la kongreso, sed ankaŭ tre favorpreze aliajn librojn.

MONŜANĜEJOJ

Proksime al la kongresejo situas kelkaj bankoj en kiuj eblas ŝanĝi eksterlandajn valutojn. La sabata labortempo de bankoj estas ĝis la 12h00.

POSTKONGRESA EKSKURSO

La Organiza komitato proponas al la kongresanoj ankaŭ la postkongresan ekskurson kiu efektivoĝos nur se estos minimume 50 aliĝintoj. Lundon, la 16-an de majo ni planas fari viziton al Krapina (trovejo de neandertalanoj), Trakoŝcan (fama kastelo) kaj Terme Tuhelj (3-hora banado en termalbanejo). Prezo: 235,00 kunaĵoj (neinkluzivita tagmanĝo kiu mendeblas je 45,00 kunaĵoj, kaj asekuro - 3,00 kunaĵoj). Limdato por (antaŭ)aliĝoj: la 30-a de aprilo telefone: 098/248-574 aŭ pere de la oficiala kongresa retadreso: lkk.bjelovar@gmail.com. Kunvojaĝi povas ankaŭ neesperantistoj.

TELEFONO POR URĜAJ BEZONOJ

Se vi havos ian urĝe solvendan problemon post via veno al Bjelovar, telefonu al 091/1905083 (Ljerka Stilinović) aŭ 098/248-574 (Josip Pleadin). NEPRE UZU TIUJN ĈI NUMEROJN NUR EN URĜAJ KAZOJ.

KONTAKTO:

Kontaktadreso de la Organiza komitato estas: lkk.bjelovar@gmail.com

Se vi trovas ian korektendan eraron en listoj de kongresanoj, nepre tuj komuniku ĝin al la Organiza komitato.

Bonvenon al Bjelovar!

La Organiza komitato:

Ljerka Stilinović (prezidantino), Franjo Forjan, Grozdana Grubišić-Popović, Marija Horvatić-Kapelac, Nenad Margetić, Josip Pleadin, Zdenka Polašek, Berislav Rubčić, Željko Saks, Spomenka Štimec

METEORITA FESTO EN HRAŠĆINA

Sabaton la 21an de majo oni muntos memorŝtonon sur la kampo sur kiun alteriĝis meteorito en vilaĝo **Hraščina** en **Departamento Krapinsko-zagorska** en la jaro 1751. Jen do la 260a jubileo de tiu evento! **KEL** dum la lastaj 15 jaroj tie organizas kulturajn programojn. Post kiam oni muntos la omaĝŝtonon je la 15a horo, **Kroata Esperanto-Ligo** organizas kulturalan programon en la bieno de **Spomenka Štimec**. La ĉefaj gastinoj estas tri artistinoj: aktorino **Vlasta Knezović**, tradukistino **Martina Čičin-Šain** kaj kantisto **Neven Mrzlečki**. **Kulturarta ensemblo Meteorit el Hraščina** havos sian folkloran programon kun pluraj folkloraj gastoj. Aktorino **Vlasta Knezović** legos ĉapitron el la libro **Ĉio por la amo** kaj tradukistino **Martina Čičin-Šain** rakontos pri tio kiel ŝi tradukis la libron. **Neven Mrzlečki** kantos amkantojn. Bonvenon!

S. Štimec


10 JAROJ DE KONKURSO POKALO KOSTRENA

Fiere ni anoncas ke ĉi-jare ni festas la dekan naskiĝtagon de la konkurso **Pokalo Kostrena**. Ankaŭ ĉi jare la konkurson partoprenos pluraj lernantoj de kroataj baz- kaj mezlernejoj. La lernantoj montros sian konon de la Internacia Lingvo en tri diversaj kategorioj: **Komencantoj**, **Progresantoj** kaj **Gelernantoj kun la supera scio**. Tiuj lastaj verkos eseeton.

La konkurso okazos en nia belega **Esperanto-domo Kostrena** inter la 20a kaj la 22a de majo. Estos organizitaj diversaj programoj por partoprenantoj. Krom la konkurso ili havos ankaŭ tempon por urbovizitado, longaj promenadoj kaj amuziĝoj ĝis malfruaj noktaj horoj. La plej kuraĝaj eble ankaŭ testos marvarmecon kiam la gvidantoj ne atentos. Ni deziras al ili multan ĝojon kaj bonan sukceson.

David Rey Hudeček kaj Katarina Savić

TRI NOVAJ LIBROJ POR LA KONGRESO EN BJELOVAR




LA KAPREOLIDO PIRGO

Josipa Katunar, esperantistino el Rijeka, tradukis Esperanten la porinfanan romanon **La kapreolido Pirgo**, kiu estas konsiderata la plej grava verko de fama kroata verkistino **Andelka Martić**. Okaze de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar, eldonis ĝin **Grafokom** el **Durdevac**.

La romano **La kapreolido Pirgo** (verkita en 1953), interalie, estas premiita per "Rid-ordeno" de polaj infanoj (1973), dediĉita al homoj aparte meritaj por pli serena kaj pli bela infaneco. La ĉefaj roluloj de la romano, la knabo **Željko** kaj la kapreolido **Pirgo**, estas veraj personoj. Kvankam la aŭtorino komencis verki kiel juna partizanino, la ideologia fono de la romano troviĝas en la dua plano. La arta valoro estas unuavice en la fakto, ke en la unua plano troviĝas infanoj. Sia romaneto estas la plej profunda kondamno de milito en la kroata porinfana literaturo. En ĝi malestas sangaj scenoj kaj priskriboj de krueleco, kiuj nuntempe svarmas en la presaj kaj elektronikaj porinfanaj medioj. Pro tio la populareco de la romano, malgraŭ la malaktualeco de la ideologia fono, retenis sian universalan karakteron ankaŭ nuntempe


J. P.



LA VIVO DE DAMORU

D-rino Malasree Dasgupta, la edzino de **Probal Dasgupta**, prezidanto de **Universala Esperanto-Asocio** estis grava kunlaboranto en la projekto **Unu hindunuia infanlibro en Eŭropo – tri eŭropaj infanlibroj en Hinda Unio**, kiun gvidis **Kroata Esperanto-Ligo** kaj financis **Eŭropa Komisiono** dum la jaroj 2008-2010. Ŝi tradukis 3 eŭropajn infanlibrojn, po unu el **Kroatio**, **Slovenio** kaj **Italio**. Ŝi el sia gepatra lingvo, la bengala, esperantigis la faman bengalan romanon **La vivo de Damoru** de **Trailokyanath Mukhopadhyay**. La Esperantajn mansukriptojn per kiuj ni tradukis la librojn de la projekto, ne necesis eldoni kadre de la projekto. Nun, kiam la projekto finiĝis, ni eldonas la bengalan verkon tradukita de **Malasree Dasgupta**, kun antaŭparolo de **Probal Dasgupta**. **Damir Mikuličić**, posedanto de la eldonejo **Izvori/Fontoj**, eldonis la verkon kunlabore kun **Kroata Esperanto-Ligo**. La titolpaĝon ornamas la diino **Purga**.

S. Ŝ.



BOŽJI ROBOVI

La fama 400-paĝa romano **Sklavoj de dio** de unu el la plej gravaj hungaraj romanverkistoj **Géza Gárdonyi** (1863-1922), pere de la Esperanta traduko de **Johano Hamvai** (eldonita de **Hungara Esperanto-Asocio** en **Budapeŝto** en 1972) ricevis sian kroatingvan eldonon. Renkonte al la bjelovara kongreso de kroataj esperantistoj ĝi aperis sub la titolo **Božji robovi** tradukita de osijeka veterana esperantisto **Aleksandar Kocian**. La tradukinto dediĉis la tradukon al sia edzino. Longe la traduko atendis sian libroforman aperigon, kaj en Bjelovar ĝi estos prezentita kiel ero en la revigliĝanta kunlaboro inter **Kroata Esperanto-Ligo** kaj **Hungaria Esperanto-Asocio**. Ĝi estas historia romano pri la mezepoka Hungarioregata de **Bela la Kvara**, kun akcentita religia fono, respektive rakonto pri la hungara sanktulino **Sankta Margareta**, kiu estis filino de **Bela la Kvara**. La libron kune prezentos **Imre Szabó**, la prezidanto de **HEA** kaj literaturprofesoro **Zdravko Seleš**. Gravus mencii, ke la kostojn de ĉi tiu eldono pagis la tradukinto mem, kaj la libron eldonis **Grafokom** el **Durdevac**. La libroprezenton en Bjelovar partoprenos organizitaj grupoj de osijekaj kaj hungaraj esperantistoj.

RONDA TABLO PRI JOSIP VELEBIT (1911-2000)

Okaze de la centa jubileo de la naskiĝo de instruisto, poeto kaj tradukisto **Josip Velebit**, **Matica Hrvatska Zaprrešić** iniciatis Rondan tablon pri Josip Velebit. La Ronda tablo okazos en Vrbovec, la loko kie Velebit postenis kiel mezlerneja profesoro pri la germana de 1965-1972. La intenco de **Matica Hrvatska Zaprrešić** la ĉeforganizanto de la programo, estas per kelkaj referaĵoj prilumi la vivon de la kroatlingva poeto kaj tradukisto, kiu multe tradukis el/al Esperanto kaj estis aparte talentita originala Esperanta poeto. La aranĝo celas starigi memor-tabulon en la **Mezlernejo de Vrbovec**, kie **Velebit** postenis. La solenajo honorigonta **Josip Velebit** okazos lige al la festo de **Urbo Vrbovec** la 14an de junio 2011 kaj ĝin kunorganizas **Urbo Vrbovec**, **Turisma asocio de la urbo Vrbovec** kaj **Mezlernejo Vrbovec**. **Departamento Zagrebačka** estas la aŭspicianto.

La vivoverkon de **Josip Velebit** prilumos prelegontoj **Stjepan Laljak** (**Matica hrvatska Zaprrešić**): *Vivo kaj verko de Josip Velebit, poeto, tradukito kaj mia profesoro en Zaprrešić*; **Ranka Novosel** (**Matica hrvatska Samobor**) *Velebit, mia profesoro en instruista lernejo en Slavonski Brod*; **Jure Križanović**, **Miroslav Barić**, **Ana Bakar**: *Josip Velebit, nia kolego kaj profesoro en Križevci kaj Vrbovec*; **Branko Ćegek**: *Poezio de Josip Velebit*; **Spomenka Štimec**: *Josip Velebit, antologia esperanta poeto kaj tradukisto*.

Velebit multe tradukis el la germana, la hungara, la slovena kaj la makedona lingvoj. El tiuj lastaj aparte elstaras la traduko de **France Prešern** *Girlando de sonetoj*, 1973, el la slovena kaj el la makedona *Ventoj de Blagoja Ivanov*. Pri la makedona kulturo li okupiĝis, kunlabore kun **Slavko Šimunić**, tradukinte *Makedonajn Popolajn Rakontojn*.

Matica Hrvatska Zaprrešić planas eldoni *Bibliografion de liaj verkoj/laboraĵoj*. Oni planas eldoni porokazan bildkarton kun lia portreto. La iniciatinto de tiu valora projekto estas **Stjepan Laljak**, prezidanto de **Matica Hrvatska Zaprrešić**.

Kiam **Velebit** postenis en **Slavonio** li publikigis en **Slavonski Brod** en la jaro 1936 la unuan fremdlingvan tradukon de estonta granda kroata poeto **Dragutin Tadijanović**. La propra eldono de la tradukoj de **Tadijanović** aperis sub la titolo *Kanto al mia koro*. El la germana li tradukis *Letero al juna poeto* de **Rainer Maria Rilke**. En la poemaro *Reeĥoj* estis eldonitaj dek liaj originalaj poemoj per **Stafeto** 1961 en *La Laguna de Tenerife* sur **Kanariaj Insuloj**. La morto de **Smail-agao Ĉengiĉ** de **Ivan Mažuranić** en lia *Esperanta traduko* aperis en 1972 ĉe **KEL**. **Tri noveloj** de **Stjepan Krčmar** en lia traduko aperis en 1980. Li inklinis al klasika kroata poezio kaj tradukis verkojn de **Ivan Gundulić** kaj **Vladimir Vidrić**. Multaj liaj Esperantaj tradukoj estis publikigitaj

en diversaj Esperantaj revuoj. Lia unua originala poemaro aperis en kunlaboro kun la usona **Bero de Ionel Onet Kanto de telegrafistoj** en 1996. Por sia poemo *Kanto de maljunulo* li gajnis internacian literaturan premion **Picenum** en Italio en 1974.

Granda Esperanta poeto, **William Auld**, kandidato por la Nobelpremio pro sia originala verkado en Esperanto, honoris **Josip Velebit** per publikigo de du liaj poemoj en *Esperanta Antologio*. El ĝi ni publikigas lian poemon *Vizaĝo ŝia*. Kroatlingvaj antologioj *Antologija svjetske lirike* kaj *Antologija svjetske ljubavne lirike* enhavas plurajn liajn tradukojn el diversaj lingvoj.

Inter niaj kolegoj troviĝas pluraj ekslernantoj de **Velebit**. Ni invitas ilin ĉeesti la solenajon en Vrbovec.

S.Š.

Josip Velebit

VIZAĜO ŜIA

Vizaĝo ŝia estas blanka neĝo, blondetaj haroj: bosket' amfavora, okuloj ĉiam pretas por sieĝo, kaj fajne tranĉaj lipoj eĉ por preĝo konvenas - pie mildaj, senparolaj.

Spite al mia edza kor' poltrona delonge ravas min la svelto mola de ŝia korp' malŝpare ampropona, kaj mamoj indaj al reĝin' surtrona, kaj lipoj pie mildaj, senparolaj.

Ŝi feliĉigas, malgraŭ ke ekflamos la lakta karn' neniam, kaj ĉi glora in-korp' nenies liton ekornamos, kaj same ja neniam kise amos la lipoj pie mildaj, senparolaj.

Ĉi nura mia Bel', kiu al Amo instigas, al sincera am' elkora, estas ja ĉarma dam' - el porcelano bazar-fenestre, la eden-infano, kun lipoj pie mildaj, senparolaj.



Fotis Fredy Fijačko por Kroata lerneja muzeo

NOKTO DE MUZEOJ EN ZAGREBO

En nokto de muzeoj okazinta la 28an de januaro 2011 **Kroata Esperanto-Ligo** partoprenis per granda programo en **Kroata lerneja Muzeo**. En la muzeo oni ekspoziciis la kompletan ĉambron de **Antonija Jožičić** (la meblaron, litajon, tablon, tapiŝojn, kurtenojn, vazaron, vestaĵon) en kiu la kroata instruistino, lerninta Esperanton en 1910, esperantigis la kroatan romanon *Konfeso* de aŭtorino **Milka Pogačić** kaj publikigis ĝin en 1913 en **Kostajnica**. Tiu romano aperis ĉinlingve en 1931 en **Ŝanhajo** kaj estas konsiderata la unua traduko de la kroata literatura verko al la ĉina. Katedro pri sinologio de **Zagreba Filozofia fakultato** kunlaboris: legis ĉapitron en la ĉina por la publiko. Kunlegis ankaŭ kroataj studentoj de sinologio. Instruistinoj el la urbo **Kostajnica**, kie la verko estis tradukita, kreis teatraĵeton pri la agado de **Antonija Jožičić**. En Esperanto fragmenton el la traduko legis **Spomenka Štimec**. Okazis prezento de Esperanto kun enkonduko al la ĉina lingvo. Esperanton prezentis **Krunoslav Puškar** kaj **Spomenka Štimec**. Vizitintoj povis lerni ĉinan kaligrafion. La kaligrafiajn lecionojn gvidis **Iva Valentić** kun la ĉina partnero.

Kroata lerneja muzeo publikigis flugfoliojn pri tiu programo inspirita de **Kroata Esperanto-Ligo**.

La urbestro de la urbo **Kostajnica**, kie la verko aperis antaŭ preskaŭ cent jaroj, ĉeestis kun sia teamo. La programo ripetigis tri fojojn dum la nokto de la muzeo. La ekspozicio viziteblis ĝis la fino de februaro 2011.

Dum la Nokto de muzeoj **Studenta Esperanto-Klubo** kaj **Esperanto-Societo Bude Borjan** distribuis flugfoliojn kaj invitis al Esperanto-kursoj.

S. Štimec



JARKUNVENO DE KFEA – MARICA BRLETIĆ HONORIGITA

La Jarkunveno de **Kroata Fervojsista Esperanta Asocio** okazis la 15an de marto 2011 en la ejo de Kroataj fervojoj ĉe Trg kralja Tomislava 11/IV. El la Jarraporto prezentita de **Roža Brletić-Višnjić** eblis interalie informiĝi ke **Marica Brletić**, prezidantino de **KFEA** en Sofio dum la inaŭguro de la 62a IFEF-kongreso en 2010 estis rekonita kiel honora membro de **Internacia Fervojsista Esperanto-Federacio**. **Marica Brletić** oficis dum tri oficperiodoj (entute naŭ jaroj) kiel sekretario de IFEF. Laŭ la graveco, la honora membreco estas la dua grado de honorigo, post la honora prezidanteco. **Internacia Fervojsisto**, la organo de IFEF, diskonigis la informon. **Marica Brletić** ne plu postenas kiel sekretario de IFEF. Ŝi daŭre prezidas **Kroatan Fervojistan Esperantan Asocion**. La prezidantaron de la Jarkunveno fotis **Boris Udier**.

ANONCO AL AMIKOJ DE JAPANIO

La 11an de marto 2011 grandega tertremo kaj eĉ pli terura posta cunamo atakis **Nordorientan Regionon de Japanio**. El amaskomunikiloj ni havas informon ke en la katastrofo pereis aŭ malaperis 27.000 japanoj, 70.000 homoj devis forlasi siajn hejmojn. La nuklea centralo Fukushima suferis escepte gravajn damaĝojn kaj la regiono je 20 km ĉirkaŭ ĝi devis esti evakuita.

Raportoj de eksestrarano de Universala Esperanto-Asocio **Hori Jasuo**, kiujn ni distribuis rete, estis aparte interesa legaĵo kun persona noto por multaj niaj membroj. Ni kun danko legis mesaĝojn de **Kikushima Kazuko**, **Syōzi Keiko**, **Tahira Masako**.

Aparte bonvenis la trankviliga mesaĝo de **Japana Esperanto-Instituto**, kiu informis ke travivis ĉiuj 77 esperantistoj-membroj de Japana Esperanto-Instituto en gubernioj **Aomori**, **Iwate**, **Miyagi**, **Hikusima** kaj **Iwaki**. Membroj de la lokaj **Esperanto-Societoj** en la damaĝita regiono travivis. JEI kore dankis pro zorgoplenaj mesaĝoj. Kelkaj el la membroj multe suferis pro cunamo: en kelkaj Esperantaj domoj la akvo grimpis ĝis la plafono!

La diligentaj japanoj klopodas kiel eble plej rapide normaligi la vivon. **Jokohama Esperanto-Rondo** ekspedis sian martan revueton **Novaĵoj tamtamas** kun nur unusemajna malfruo ...

Ni deziras al ĉiuj japanaj esperantistoj rapidan renormaliĝon de la vivo kaj ke ilia laboro pri Esperanto kontinuu. Nia **Esperanto-Komunumo** bezonas **Japanion**.

S. Ŝ.

NIAJ KURSOJ

ZAGREBO

Marija Jerković instruas en **Mjesna zajednica Utrine** progresigan kurson, kiu komenciĝis en januaro 2010.

Spomenka Ŝtimec instruas en **Esperanto-Societo Bude Borjan** kurson por 4 komencantoj.

BJELOVAR

Josip Pleadin instruas en **Bjelovar** kurson kiu celas refreŝigi scion de Esperanto al pluraj bjelovaranoj aktiviĝantaj pri la organizo de la 9a kongreso de kroataj esperantistoj.

VALPOVO

La 1-an de februaro 2011 komenciĝis en **Urba biblioteko en Valpo** Esperanto-kurso. Instruas **Zlatko Lončarić** kaj **Mirko Vidaković**. Ĉirkaŭ 20 kursanoj lernas, la duono elinter ili estas gejunuloj. Temas pri ekskursemaj geamikoj de la naturo kiuj nun lernas Esperanton.

D. Klobučar

S. Ŝ.



PUPKOLEKTO DE EMILIJA OBRADOVIĆ EN NOVA GRADIŠKA

Emilija Obradović, emerita pedagogino el Nova Gradiška, insipiriĝis per artikolo en **Tempo** pri pupekspozicio en Japanio kaj informas ke ŝi mem posedas pupkolekton el 80 pupoj, kiuj alveturis al ŝia hejmo el diversaj flankoj de la mondo kun informoj pri tiuj landoj. Ŝi komencis kolekti pupojn vestitaj per naciaj kostumoj en kvindekaj jaroj kaj ŝia kolekto dum jaroj bele kreskis. Ŝi proponis pupojn por ekspozicio dum la kongreso de kroataj esperantistoj. Sur la foto: Pupoj kun Emilija Obradović en ŝia hejmo en Nova Gradiška.

S. Ŝ.

KROATA ESPERANTO-LIGO KANDIDATIĜAS PRI DU GRUNDTVIG-PROJEKTOJ

Kio estas **Grundtvig**? Por kompreni respondon ni unue devas respondi al la demando Kiu estis Grundtvig? **Nikolaj Frederik Severin Grundtvig** (la 8an de septembro 1783 - la 2-an de septembro 1872) estis dana pastro, aŭtoro, poeto, historiisto kaj instruisto. Lian nomon portas klerigaj programoj de **Eŭropa Unio**, rilatantaj al la personoj de la tria aĝo. **Kroata Esperanto-Ligo** kandidatiĝis en la jaro 2011 du klerigajn programojn rilatantaj al la klerigo de personoj de la tria aĝo. Ambaŭ projektoj estis kandidatiĝitaj per la kroata **Agencija za mobilnost i programe Europske unije**. Nun KEL atendas la respondon de la brusela Grundtvig-oficejo por vidi ĉu la proponitaj programoj kontentigas la EU-normojn.

La unuan programon gvidas **Inter-Kulturo el Slovenio**. En tiu programo KEL aperas kiel kunpartnero kun esperantistaj asocioj el **Danlando, Slovakio kaj Pollando**. La projekto celas eduki pri eŭropaj valoroj la personojn de la tria aĝo.

La dua Grundtvig-projekto por kiu kandidatas KEL okazus en **Kroatio**, en **Premantura**, en **Istrio**. Ĝi celus apliki literaturon por klerigi blindajn esperantistojn de la tria aĝo el pluraj landoj per komuna kurso en **Premantura** en printempo 2012. Ĉu niaj proponitaj programoj plaĉos al Grundtvig-estroj? Se jes, se subvencioj por ties realigo estos aprobitaj al **Kroata Esperanto-Ligo**, vi legos venontnumere. Vi mem havos la okazon partopreni ...



LECIONOJ PRI SOROBANO EN LA ZAGREBAJ LERNEJOJ

Konata japana esperantistino loĝanta en Britio, **Kimie Markarian**, vizitis Zagrebon inter la 11a kaj 18a de februaro. Ŝi instrucele gastis en tri elementaj lernejoj por prelegi pri la japana tradicia kalkulilo sorobano. Ŝi gastis ĉe la familio **Radovanović-Filipčić**, kiu havas denaske Esperanto-parolantajn infanojn **Vedran kaj Zrinka**. La lernejo de **Vedran Radovanović, Elementa lernejo Nikola Tesla** havis plurajn lecionojn pri kaj per sorobano. **Vedran** asistis al **Kimie** okaze de ŝia prelego en **Esperanto-Societo Bude Borjan** la 16an de februaro 2011. Krome **Kimie** vizitis kun siaj lecionoj pri sorobano **Elementan lernejon Waldorf** kie instruas esperantistino **Mirjana Radanović** kaj **Elementan lernejon Retkovec**, kie instruas **Judita Rey Hudeček**. Dum ĉiuj lecionoj Esperanto peris la scion pri la tradicia japana kalkulilo.

Sur la foto de **Vanja Radovanović**, jen gelernantoj en la elementa lernejo **Nikola Tesla**. La knabo kiu portas la numeron "4" estas **Vedran**. Lernantoj portas ciferojn japanajn (de 1 ĝis 10, de maldekstre al dekstre).

"La japana lingvo devenas de la ĉina lingvo, kaj cifero konsistis el simboloj. Nur post kiam okcidentaj kulturoj atingis Japanion, tra Ĉinio kaj per rektaj kontaktoj de 18a kaj 19a jarcentoj, japanoj lernis okcidentan matematikon kaj lernis skribi per arabaj ciferoj. Ĝis tiam japanoj uzis vertikale skribitajn literojn (simbolojn), eĉ matematika teksto estis skribita vertikale." - instruis **Kimie** montrinte al lernantoj japanajn lernlibrojn por 7-jaraj infanoj.

Por ĉiuj lernantoj estis interesa sperto havi japanan instruiston, kiu parolas Esperanton kaj kiu kalkulas per sorobano. Pluraj instruistoj mem povis sperti Esperanton kiel transkulturan perilon.

Kimie Markarian/Vanja Radovanović

MEVO KAJ MOVO EN KVARNERO

MEVO (Marborda Evento), novtipa kaj nekutima ripoziga aranĝo de **Orbis Pictus de Viŝnja Branković (Trieste, Italio)** dum la unua printempa semajnfino (25-a -27-a de marto 2011) movigis kaj renkontigis dekon da esperantistoj, simpatiantoj de Esperanto kaj iliaj amikoj (el **Trieste, Udine, Rijeka, Opatija, Matulji, Karlovac kaj Zagrebo**) en **Opatija**, la naskiĝurbo de kroata turismo. La plentempaj MEVanoj ĝuis la loĝadon, naĝadon, manĝojn kaj nunan tre modernan komforton de la ĉemara kvarstela hotelo **Kristal**, historia hotelo, iam posedata de la fama germana aktorino **Tilla Durieux**.*

Triestaj pensiuloj, grupete, pare, individue, memstare kaj propraritime, peraŭte, buse kaj perpiede vizitadis kaj esploradis la proksimajn pitoreskajn urbetojn **Brseč, Mošćenice, Mošćenička Draga, Lovran, Volosko** kaj promenis laŭ 12-kilometra apudmara promenejo, probable la plej bela en la mondo.

Dum la unua vespero la gastoj povis konversaci ankaŭ itallingve kaj profiti de la praktikaj turismaj kaj aliaj informoj de nia UEA-ĉefdelegito, **Boris Di Costanzo**, loĝanta en **Opatija**.

La sabatan vesperon la speciala gasto de **Orbis Pictus, Emanuele Rovere**, jam fiksinta printempajn kaj somerajn koncertojn tra pluraj eŭropaj landoj, en malformala etoso de la hotela ĉambro, aŭskultigis sian nove faritan kompaktdiskon **Duonvoĉe ... tutkore**. Krom la agrabla vespero **Manuel** al novaj amikoj donacis ankaŭ la diskon mem, ĉar, distribuante ĝin senpage li informas pri la senprofita bonfara asocio **Evidente**, kiu, inter alie, helpas al blindaj infanoj en **Afriko** kaj al kiu bonvenas la financaj kontribuoj.

Spontane koincidis la emo denove renkontiĝi en Kvarnero - se ne pli frue - tiam dum la "kaŝtana oktobro" kaj la tradicia 38-a **Marunada** en **Lovran**, inter la 14-a kaj la 16-a de oktobro 2011.

Bonvenu ankaŭ vi, al denove pli granda kaj pli internacia MEVO!

Viŝnja Branković

*priskribita en romano "Tilla" de Spomenka Ŝtimec

COLETTE

Colette estas familia nomo de la verkistino. Ŝia vera nomo estis **Sidonie Gabrielle Colette**. Ŝi naskiĝis la 28an de januaro 1873 en granda vilaĝo de Burgonjo, en departemento Yonne (89), regiono Puisaye, vilaĝo nomita St. Sauveur (= Sankta Savanto).

Parenteze, mia edzino estis lernantino (ĵus antaŭ la Dua mondmilito) en la sama lernejo, kiun **Colette** priskribas en *Claudine en la lernejo*, sed 50 jarojn poste. Feliĉe, mia edzino ne imitis Colette ĉar ŝi estas edziĝinta kun mi de post 68 jaroj.

Lasta infano de Sido kaj de la kapitano Colette, ŝi vivis feliĉan junecon en St. Sauveur en Puisaye, meze de herberoj kaj arbaroj floritaj printempe de narcisoj.

Provinca junulino, ŝi renkontis Henrikon Gauthier Villars, kromnomatan Willy, kaj mirigita de tiu dando el Parizo, ŝi edziniĝis kun li la 15an de majo 1893. Ŝi estis 20-jara. Willy konatigis al sia nova kampara edzino la mondon de literaturo, spektaklo kaj muziko.

Rimarkinte la naturdotojn de sia edzino pri literaturo, li persvadis ŝin skribi siajn lerneajn rememorojn kaj senskrupule priskribis ilin. Temas pri serio da libroj: *Claudine en la lernejo*, *Claudine en Parizo*, *Claudine kun edzo*, *Claudine foriras* ... ĉiuj publikigitaj sub la sola aŭtonomo de Willy (1901-1903).

Sed Willy estis, inter aliaj, amanto de Marie-Louise Servat, edzino de Emilio Cohl, kaj havis filon kun ŝi. Colette jaluza kaj humiligita pro tiu rolo de trompita edzino, iom post iom liberiĝis kaj komencis karieron en muzikalo. Tie ŝi dancis kun leĝeraj kostumoj, eĉ sen kostumo, en Moulin Rouge, ekzemple. Estis jaroj de skandalo kaj de moralliberiĝo. Ŝi eksedziniĝis de Willy en 1906 kaj vivis kelkajn virinajn aventurojn, precipe kun la filino de Duko de Morny, kiu donacis al ŝi domon en Bretonio, apud St. Malo. Dum tiu epoko (1906-1912) ŝi publikigis, inter alie, *La dorsa flanko de Muzikalo*.

En 1912 ŝi renkontis Henrikon de Jouvenal, politikiston kaj ĵurnaliston, al kiu ŝi edziniĝas. Li ebligas al ŝi skribi en la ĵurnalo *Le Matin*, kies li estis ĉefredaktoro. Kun li ŝi havis filinon Bel-Gazou (= bela pepulino, en la provenca lingvo).

Kvardekjara, ŝi ludis rolon de iniciulino apud la filo 17-jara de la filo de sia dua edzo. Tio nutris la temojn de *La verda tritiko* en 1923.

La jaro 1923 estas ankaŭ la dato de la dua eksedziniĝo.

Muzikamantino, ŝi kunlaboris kun Ravel en la 1920-aj jaroj en *La infano kaj la sorĉaĵoj*.

Finfine, en 1925, ŝi renkontis la trian edzon Maurice Goudekot. Li estos la lasta.

Dum okupadperiodo ŝi restadis kelkajn monatojn ĉe sia filino en vilaĝo en departemento Corrèze, sed reiris al Parizo trapasi la lastajn jarojn de la mondmilito.

En 1945 ŝi unuanime estis elektita en Goncour-Akademion kaj eĉ en 1949 ŝi fariĝis prezidantino.

Ŝiaj kompletaj verkoj en 15 volumoj estis eldonitaj en la eldonejo de ŝia edzo. En 1953 ŝi estis nomita Granda Oficiro de Honorlegio.

Sed, kripla pro artrozo, ŝi devis sidi dum pluraj jaroj en fotelo en sia bela apartamento en Placo de Vogezoj, kie ŝi mortis, 81-jara, la 3-an de aŭgusto 1954. Malgraŭ sia malbona reputacio kaj la rifuzo de religia ceremonio far katolika ekzlezio, Colette estas la sola virino kiu rajtis naciajn funebraĵojn.

Ŝia tombo estas en Père Lachaise en Parizo. Ŝia filino ripozas apud ŝi.

Roland Deleigneau

KRUNO PUŠKAR

Kiel ni informis en la decembra numero de **Tempo**, studento pri la la angla **Kruno Puškar**, en **Križevci** estis elektita por la persono de la jaro 2010. Kun la gratuloj, **Tempo** petis lin koncize prezenti sin. Jen lia respondo:

Mi naskiĝis la 31an de marto 1986 en Koprivnica, finis bazan lernejon kaj gimnazion en **Križevci**. Mi preparas la diplomlaboraĵon en la fako pri la temo **Esperanto kiel Eŭropa Lingvafranka**. Kadre de la diplomlaboraĵo mi intervjuis centon da kroataj esperantistoj pri ilia sinteno al Esperanto. Ekde 2009 mi studas la ĉinan kaj ekde 2010 la japanan en Filozofia fakultato en Zagrebo. Mi lernas ankaŭ aliajn lingvojn. Esperanton mi lernis ĉe **D-ro Velimir Piškorec** en Filozofia Fakultato en Zagrebo en 2008/2009. Mi estas estrarano de **Kroata Esperanto-Junulara Asocio**.

KROATOJ EN KOPENHAGO

Listo de aliĝintoj de la **96-a Universala Kongreso de Esperanto** en **Kopenhago** (23a ĝis la 30a de julio 2011) montris la 31an de marto 1138 kongresanojn el 59 landoj.

La nomoj de ĉiuj 16 kroataj kongresanoj aperis jam en la lastjara, unua aliĝperiodo. Pluraj inter ili jam tiam akiris ankaŭ la bonprezan individuan flugbileton **Zagrebo-Kopenhago** (ĉ. 820 kunaoj / 110 eŭroj) kun Croatia Airlines, aĉetitan pere de www.aviokarte.hr.

Kvar kroataj esperantistoj (**Mirjana Žezelj**, **Zlata Nanić**, **Bojana Đuričić** kaj **Višnja Branković**) antaŭkongrese partoprenos ankaŭ la samurban, **44-an ILEI-konferencon**, (la 17an ĝis la 23a de julio 2011). Ili ŝparis per decembra finpago de kunloĝado en simpla kaj bonpreza urbocentra hotelo kun internacia grupo de **Orbis Pictus** de **Višnja Branković**. La sekretario de KEL, **Spomenka Štimec** kaj **Josip Pleadin**, la redaktonto de la kongresa kuriero, loĝos private, ĉe la kopenhagaj amikoj.

Ĉiuj kongresanoj kaj legantoj de **Tempo** ankoraŭ povas aliĝi al dumkonferencaj kaj dumkongresaj ekskursoj de **Orbis Pictus** (tra Kopenhago kaj ĝia ĉirkaŭo, dania kaj svedia), al la komuna vespermanĝo kun esperantista artisto kaj ricevi aktualajn informojn kaj konsilojn pri loĝado kaj flugo.

Bonvenu (inter Kubo kaj Vjetnamio) kunkongresi kun ni en Eŭropo!

Višnja Branković

NOKTO DE MUZEOJ EN BJELOVAR

En la programo organizita la 28-an de januaro 2011 dum **Nokto de muzeoj** en **Urba muzeo de Bjelovar**, okazis ankaŭ la ekspozicio pri **H. C. Andersen**. La ekspozicio gastis en "Malgranda galerio", kiun uzos ankaŭ la Esperanta ekspozicio dum la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en majo 2011. En la ekspozicio organizita de la kustosino **Silvija Sitta** partoprenis ankaŭ **Dokumenta Esperanto-Centro (DEC)** el **Đurđevac** per prunto de Esperantlingvaj versioj de Andersenaj verkoj. La partopreno de **DEC** en la ekspozicio de **Urba muzeo en Bjelovar** estas la unua publika uzado de materialo troviĝanta en **DEC** far oficiala muzea institucio. La kunlaboro estas menciita ankaŭ en la luksa ekspozicia katalogo **Dobra večer, gospodine Andersen** (Bonan vesperon, sinjoro Andersen). La ekspozicio restis malfermita ĝis la 28-a de februaro 2011.

Josip Pleadin

Nikolao Ĥohlov



kabaredo

REPRESITA KABAREDO VERDA RIDO DE NIKOLAO ĤOHLOV

En Durdevac estis en 2010 represita plia verko de Nikolao Ĥohlov. La titolo de la kabaredo estas **Verda Rido**. Josip Pleadin trovis ĝin esplorinte la malnovajn numerojn de la kroata Esperanta gazeto **Konkordo**, oficiala organo de **Zagreba Esperantista Societo**. La kabaredon Ĥohlov verkis por la bezonoj de la **Unua Sudslava Esperanto-Kongreso**, kie ĝi la unuan kaj la solan fojon estis surscenigita.

Pleadin provizis la verkon per ampleksa enkonduko en kiu li klarigas cirkonstancojn en kiuj Ĥohlov verkis en Zagrebo. Pleadin korektas opiniojn de Ivo Rotkvić, kaj ĵetas novan lumon al la vivo de tiu fascina poeto, kiu estis zagrebano inter la jaroj 1921-1924, kaj kiu troviĝis en la fokuso de la zagreba Esperanto-vivo kaj mem fokusigis ĝin. (Samkiel ni lernas en la teksto de **Marton Fejes** ke la samovaro en la poemo de Ĥohlov, ĉe kiu "sidas ruso kaj hungaro" estas simpla tekruĉo, aĉetita en Zagrebo, kiun la poezia fantazio transformas al samovaro, same ni ricevis informon de **Jelena Manojlović** ke la sledo en **Vintra Fabelo** estis fakte trajneto **Samoborček** per kiu la kabaredistoj ekskursis "post amuza kabaredo". Kaj ke **Mia Nita**, **rozkisita**, fakte estis iu **Ljubica** ... Tiuj eroj ja igas la poeton Ĥohlov nur pli proksima kaj pli interesa.)

S. Štimec

DRAMA GRUPO PREPARAS NOVAN TEATRAĴON

La 8-a de aprilo je 19h30 Drama grupo denove surscenigas per la nova kroatlingva teatraĵo en **Centar za kulturu Peščenica**. Tie okazas la ĉi-jara **Renkontiĝo de zagrebaj teatraj amatoraj**. La grupanoj mem prizorgis la tekston **Oni glitigis nin**. Tea Janković preparis interesan scenografion por la teatraĵo. Grupanoj mem reĝisoras ĝin. **Bonŝancon!**

Vanja Radovanović

ESPERANTO EN FILOZOFIA FAKULTATO DE ZAGREBO

Post kiam 30 studentoj de la germana lingvo en la zagreba **Filozofia fakultato** dum la vintra semestro 2010/2011 per la germana lingvo kaj germanlingvaj tekstoj studis pri planlingvoj dum bakalaŭra studado, ĉi-semestre estas instruata plia priesperanta fako. Kreskas la ebleco studi Esperanton en Filozofia fakultato. **D-ro Velimir Piškorec** instruas priesperantan fakon al ses studentoj, kadre de la ĝenerala studpropono de **Filozofia fakultato**. La studentoj (negermanistoj) studas dum la somera semestro la fakon titolita **Interlingvistiko kaj la strukturo de Esperanto**.

V.P.

DIPLOMLABORAĴO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO EN KROATIO

Instruistino **Marija Jerković** estas la unua el tri kroataj studentinoj en la **Universitato Adam Mickiewicz** en **Poznano**, kiu sukcesis ekzameniĝi pri ĉiuj studobjektoj dum la trijara postdiploma studado de interlingvistiko. Nun ŝi preparas diplomlaboraĵon **Historio de Esperanto-instruado en Kroatio** kaj invitas kroatajn esperantistojn helpi per ĉi-tamaj informoj (mjerkovic@net.hr, poŝtelefono 0981771741).

M. Jerković

GRANDAJ VORTAROJ DE LUCIJA BORČIĆ – NOVAJ PREZOJ !

Multaj niaj membroj per sia abono de la Vortaroj helpis ke ili aperu. Nuntempe la vortaroj estas aĉeteblaj en pluraj librovendejoj. **Granda Vortaro Esperanta-Kroata** kostas en publika librovendejo 320,00 kn. **Granda Vortaro Kroata-Esperanta** kostas 350,00 kn. Ĉe eldonistoj **Sveučilišna knjižara** de **Damir Mikuličić** kaj **Kroata Esperanto-Ligo** eblas aĉeti la **Vortarojn** kontraŭ rabatitaj prezoj.

Granda Vortaro Esperanta-Kroata kostas ĉe ni **220,00 kn!**

Granda Vortaro Kroata-Esperanta kostas ĉe ni **250,00 kn!**

S. Štimec

KUNLABORO KUN MAKEDONIO

Zagreba esperantistino **Kostadinka Šimunić**, kies gepatra lingvo estas la makedona, esperantigis tekstojn el la libro **Parolado antaŭ sunsubiro** de **Dragan Boševski**, eldonita dulingve, makedone kaj Esperante de Esperanto-Societo "**La Progreso**" en **Prilep** en **Makedonio** en 2010.

Judita Rey Hudeček prezidas ne nur **Kroatan Esperanto-Ligon** sed ankaŭ **Kroatan-Makedonan Asocion**. (Ŝi dum la studjaroj vivis en Skopje kaj la makedona estas unu el ŝiaj lingvoj.) Por la bezonoj de **Kroata-Makedona Asocio** ŝi verkis libron pri vino, sub la titolo **Vino ligas kaj konektas nin**. Dorsfanke publikigita biografio informas pri ŝia agado por **Esperanto**. Samformatan libron pri **Virino** en la makedona popolpoezio ŝi publikigis en 2009. Ŝi prezentis al la zagrebaj esperantistoj la novan vinlibron en **Esperanto-Societo Bude Borjan** la 31an de marto 2011. Por ambaŭ libroj ŝi kontribuis per desegnaĵoj.

POETO LUKO PALJETAK – NOVA MEMBRO DE RUSA LITERATURA AKADEMIO

Verkisto **Luko Paljetak**, poeto, tradukisto el multaj lingvoj kaj amiko de Esperanto fariĝis lastatempe elektita membro de la **Akademio de la Rusa Literaturo**. Li estis la unua eksterlanda membro de la prestiĝa Rusa Literatura Akademio, fondita en 1783 de la rusa carino **Katarina la Granda**. La prezidanto de la Akademio estas verkisto **A. Bjeljajev**. Du pliaj eksterlandaj verkistoj akceptitaj al la Akademio estas italo **Umberto Eco** kaj ukrainano **Boris Olejnik**.

La rusa estas nur unu el la lingvoj el kiu la poliglota poeto **Paljetak** kroatigas.

Paljetak estis gasto de **Kroata Esperanto-Ligo** en **Hraščina** en 2008. Pro lia persistemo enmeti ankaŭ la Esperantan tradukon de **Onklo Maroje** en la jubilean kolekton **Lucija Borčić** retradukis **Marin Držić** por la impona 19-lingva kolekto de tradukoj de **Onklo Maroje**. Ŝi retradukis post kiam estis konstatite ke ne plu troveblas la traduko de **Srdan Flego**, uzita por teatra gastado en UK de Kopenhago en 1962.

Luko Paljetak publikigis la tradukon de **Lucija Borčić** kadre de la 1678-paĝa enciklopedio pri **Dundo Maroje** publikigita en 2008, okaze de **500-jara jubileo** de la naskiĝo de komediisto el **Dubrovnik Marin Držić (1508-2008)**

S. Ŝ.

VIŠNJA STAHULJAK

Viŝnja Stahuljak (edziniĝinta Chytil) naskiĝis en Zagreb la 10-an de marto 1926, kie ŝi abituriĝis en gimnazio. Diplomiĝis pri solo-kantado en la **Zagreba Muzika Akademio**. En la **Filozofia fakultato** studis etnologion kaj la kroatian kaj germanan lingvojn. Pri pedagogio de solo-kantado ŝi specialiĝis ĉe la Akademio "**Santa Cecilia**" en Romo.

En la **Muzika lernejo "Blagoje Bersa"** ŝi fondis fakon pri solo-kantado. Ekde 1948 ŝi aktivis en la **Zagreba Pupteatro** kiel kantistino, aktorino, pupistino kaj redaktoro.

Ekde 1953 ŝi publikigis poezion, prozon, dramojn kaj literaturajn verkojn por infanoj. Ŝi publikigis pli ol tridek verkojn, el tio ok poeziajn verkojn. Ŝiaj verkoj estas tradukitaj al la angla, franca, germana, hungara ĉeĥa, pola, makedona, islanda kaj al esperanto.

Ŝi ricevis plurajn literaturajn premiojn, el kiuj la premiojn "**Grigor Vitez**" kaj "**Ksaver Šandor Gjalski**".

Viŝnja Stahuljak estis granda amiko de esperanto kaj ŝi ĉiupaŝe propagandis ĝin, pli ol esperanto-parolantoj. Kiam antaŭ ok jaroj **Gerrit Berveling** publikigis en **Fonto** miajn tradukoj de ŝiaj sonetoj, ŝi konstante kunportis tiun numeron de **Fonto** en sia mansako fierante ke ŝiaj poemoj aperis en **Brazilo** kaj per esperanto cirkulas tra la mondo. En _____ ŝi partoprenis la liritaturan renkontiĝon en **Hraščina** en la bieno de **Spomenka Ŝtimec** kaj tie legis siajn verkojn.

Kiam mi donacis al ŝi mian **Grandan vortaron Kroata-Eseprantan**, ĝi ĉiam troviĝis sur ŝia labortablo, por ke ŝi povu montri al la vizitantoj ke esperanto ne estas simpla bagatelaĵo, sed grava afero kun riĉa literaturo kaj similaj fakaj eldonoj.

En 2004 ŝi donacis al mi sian poezian verkon "**Sonetoj**" (**Soneti**), kiun mi tradukis al esperanto, kaj en 2009 la sonet-libron "**Melodio de sendormo**" (**Melodije nesance**), kiun mi komencis esperantigi.

VODNIKOVA 9 – NIA ESTONTA EJO

590. Vera Brigljević	13,55 eŭroj
591. Zlata Nanić	13,55 eŭroj
592. Ivo Borovečki	16,28 eŭroj
593. Željka Bradić	13,55 eŭroj
594. Drago Smolić	5,42 eŭroj
595. Spomenka Ŝtimec	6,78 eŭroj
596. Zlatko Hinšt	13,55 eŭroj
597. Olga Ŝtajdohar-Paden	27,10 eŭroj
598. Tomo Plačković	27,10 eŭroj
599. Blanka Pavlović	10,87 eŭroj
600. Faruk Islamović	9,46 eŭroj
Post decembro kolektite	157,21 eŭroj

Ekde la jaro 2003 KEL kolektis

inter siaj membroj

26.586,19 eŭrojn!

En la jaro 2011 ni repagis nian krediton al Universala Esperanto-Asocio!

En la jaro 2010 kaj 2011 ni repagadas nian krediton por centra hejtado, muntita en Vodnikova en 2009.

Nia ŝuldo por centra hejtado estas nun **595,34 eŭroj**.

Nia granda kredito reduktiĝis al **27.963,52 eŭroj**.

INFORMTAGO EN ISTRIO; PRI EU-KULTURAJ PROJEKTOJ

Ministerio pri kulturo okazigis la 18an de marto 2011 en **Novigrad** en **Istrio** Informan tagon por kulturagantoj de Istrio. La celo de la programo estis prezenti kulturajn programojn de **Eŭropa Unio** kaj informi kiel kulture kunlabori kun EU. **Ministerio pri kulturo** invitis reprezentanton de EU kaj unu kroatan kaj unu slovenan gvidinton de la kulturaj projektoj por la tempo 2008-2010. La projekto de Kroata Esperanto-Ligo **Unu hindunua infanlibro en Eŭropo – tri eŭropaj infanlibroj en Hinda Unio** estis prezentita de **Spomenka Ŝtimec**.

La info-tago estis okazo informi slovenan preleginton pri kroataj esploroj de **Davor Klobučar** pri la unua slovena esperantisto **Egon Mosché**, kiu agis en **Sud-Afriko**. En la jaro 2012 la kultura partnero de EU estos **Sud-Afriko** kaj kulturaj agantoj esploras temojn rilatantaj al EU.

En 2001 **Internacia Kultura Servo** eldonis ŝian poemkolekton **Krepuskoj**, tradukitan de ŝia gimnazia koleginino **Zora Heide** kun kiu ŝi daŭre amikis ĝis ŝia forpaso. **Zora Heide** tradukis al esperanto plurajn el ŝiaj infanrakontoj, plejparte pri la muzika temo kaj muzikaj instrumentoj.

Kerne poeto kaj muzikisto **Viŝnja Stahuljak** konstante riĉigis nian literaturon kaj surprizadis per siaj elegantaj esprimoj, riĉaj ideoj kaj motivoj. Kiam ŝia edzo forpasis, kvazaŭ estus malaperinta ŝia inspiro kaj ŝi ne plu emis verki.

Ŝi forpasis la 3-an de marto 2011. Malĝojaj pro ŝia malapero, niaj koroj funebras kaj ni ne povas kredi ke tiu poezia genio ne plu spiras inter ni.

Lucija Borčić

KONGRESOJ KAJ KONFERENCIOJ VIZITINDAJ EN 2011

Kontaktadreso de Kroata Esperanto-Ligo (KEL):

Kneza Mislava 11, HR-10000 ZAGREB

Tel: ++385(0) 1 4617550

Faksilo: ++385(0)1 461 9373

esperanto@zg.t-com.hr

www.esperanto.hr



7a - 14a de majo
63a Kongreso de IFEF
(Internacia Fervoja Esperanto-Federacio) en
Liberec, Ĉeĥio. Inf: Kroata
Fervoja Esperanto-Asocio,
Mihanoviĉeva 12, 10000 ZAGREB,
zlatko.hinst@hznet.hr



17 - 23a de julio

44-a ILEI-Konferenco
en Kopenhago, Danio. Inf.
m.jerkovic@net.hr



23 - 30a de julio

96-a Universala Kongreso de
Esperanto, Kopenhago, Danio. Inf.:
Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe
Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam,
NL, kongresoj@co.uea.org, tel.: +31 (0)10
436 1044, fakso: +31 (0)10 436 1751

14a - 15a de majo

9a Kongreso de Kroataj
Esperantistoj en Bjelovar. Inf. ĉe
KEL kaj lkk.bjelovar@gmail.com;
http://www.ipernity.com/home/
kroata.kongreso



9. kongres
hrvatskih esperantista
9-a kongreso
de kroataj esperantistoj

14-an de majo

10h00 - 14h00 Kongresa programo
15h00 - Vizito de ekspozicio en la Urba muzeo
16h00 - 22h00 - Tagmango kaj amuzvespero

15-an de majo

9h00 Starto de kongresa ekskurso al Daruvar, Veliki Grdevac
kaj Rekreacia centro Kukavica

23 - 30a de julio

42a IJK, Internacia Infana-junula Kongreseto
Hundested, Danio, Inf.: Bert Schumann, 9 rue Couradin, FR-
35510 Cesson-Sevigne, Francio, infana.kongreseto@gmail.com



30a de julio - 6a de
aŭgusto

84-a SAT-Kongreso
Sarajevo, Bosnio kaj
Hercegovino. Inf.: 84-a SAT-
Kongreso, Kralja Tvrtka 19,
Ba-71000 Sarajevo, Bosnio kaj
Hercegovino, satkongreso@
esperanto.ba Tel/fakso: +387-
33-205487



20a - 22a de majo

Pokalo Kostrena. Kroata
konkurso pri scio de Esperanto por
lernantoj el elementaj kaj mezaj
lernejoj. Inf.: Kroata Esperanto-
Ligo, Kneza Mislava 11, 10000
ZAGREB, Tel: 01 461 7550, Faks: 01
4619373, esperanto@zg.htnet.hr kaj
esperanto.rijeka@ri.htnet.hr

21a de majo

Meteorita festo en Hrašćina-Trgovišće
(Bieno de Spomenka Štimec) Inf. ĉe KEL.



14 - 21a de julio

67-a Internacia Junulara
Kongreso, IJK en Hlibivka,
apud Kievo. Inf.: Ukraina Ligo
de Esperantista Junularo kaj
TEJO, Mikaelo Lineckij, tel: +38
(044) 223-12-55, ijk-67@ukr.net

14 - 21a de julio

Kongreso de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj
(LIBE), Olomouc, Ĉeĥio. Inf: priborsky@brailnet.cz kaj ĉe
KEL.

31a de julio - 6a de aŭgusto

Tria boatado sur la rivero Kupa Karlovac - Sisak, Inf.
Srećko Radulović, Tel. (00 385) 992433352

1a - 6a de aŭgusto

MIRO (Mirinda Internacia Renkontiĝo), Stara Sušica,
Kroatio. Inf.: www.keja.hr; keja.hem@gmail.com

16 - 18a de septembro

Renkontiĝo de esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj.
Hrašćina-Trgovišće, bieno de Spomenka Štimec, Inf. ĉe KEL

29a de septembro - 2a de oktobro

22a Montkabana Renkontiĝo, Valvazorjev dom apud
Jesenice, Slovenio.
Inf. Vanja Radovanović, vanja.radovanovic@ericsson.com

En la mondo en 2011 okazos pli ol 100
kongresoj, konferencoj kaj renkontiĝoj
kie la sola laborlingvo estas Esperanto.
Plena kalendaro de Esperanto-aranĝoj
en la 2011 videblas ĉe retpaĝo:
<http://www.eventoj.hu>